

Redakta noto

Pasintjare ISAE festis sian centjariĝon. En tiu ĉi jaro 2007 Eŭropa Unio fariĝas 50-jara: por komune negoci, ses okcidenteŭropaj ŝtatoj fondis je la 28-a de marto 1957 la Eŭropan Komunan Merkaton, kiu poste pluevoluis al Eŭropa Komunumo kaj en la jaro 1993 ŝanĝiĝis al Eŭropa Unio. Tiu ĉi EU kreskas, pligrandiĝas, politike intertraktas. Hodiaŭ la intertempe 27 membroŝtatoj komune decidas pri siaj ekonomio, ekstera kaj sekureca politiko, kaj kooperative kunlaboras en internacia kaj jura politiko. En eŭrop-progresaj landoj komuna monsistemo, la eŭro, anstataŭas ekde la jaro 1998 la respektivajn antaŭajn ŝtatajn monsistemojn ĝis tiam validajn. La "mona Eŭropo" do jam ekzistas. Temas pri stabiliga pakto, kiu komune prenas sin kontraŭbatali eventualajn ŝtatajn enŝuldiĝojn kaj inflacion.

La tri grandaj lingvogrupoj en Eŭropo – la latinida, ĝermana kaj slava – same kiel ties dialektoj kaj parolnuancoj ne nur buntigas la diversajn populgrupojn sed fakte ankaŭ difinas – same kiel vestaroj kaj tradicioj – la kulturon de la diversspecaj membroŝtatoj. Komunan lingvon Eŭropo ne havas – onidire ne bezonas tion, ĉar ĉiuj naciaj lingvoj de membroŝtatoj estas laŭ "Roma Konvencio" samrajtaj. Plua centraligo de politikaj kompetentecoj en la belga (nuntempe kvazaŭ ankaŭ eŭropa) ĉefurbo Bruselo kaj kontinua demokratigado oficiale do ne forprenos la kulturan ĉarmon de la diversaj patrolandoj. Ĉu Eŭropo, tiom samrajta por ĉiuj eŭropanoj, povas malsukcesi? Ĉu la eŭropa ideo povas fiaski? La grandeco de EU, ĝia politika interplektiteco sur ĉiuj kampoj, sed antaŭ ĉio la sensebla elformiĝo de Eŭropa vivobazo – eĉ ia Eŭropa identeco – certe malebligos tion. Eŭropo, tion sentas ĝiaj diversŝtataj civitanoj, en la koncepto estas sekuriga, avantaĝa kaj profitiga.

En la lasta paĝo de tiu ĉi Scienca Revuo (p. 210) estas skizita la hodiaŭa EU el vidpunkto de svislanda "Neue Zürcher Zeitung", do de ĵurnalisto el neEUMembroŝtata eŭropa lando, kiu, same kiel Britujo, ne apartenas al la "mona Eŭropo" komune portanta kaj venkanta eventualajn negativajn konsekvencojn. Ne sen iom da ĥolero pri la eŭropa lingvopolitiko – kontraŭe al la opinio de la prezidanto de EU-komisiono mem, por kiu la lingva diverspeco ne estas problemo sed ŝanco – ni, la esperantistoj, konsideru la faktojn pri la slogano "Unueco en Diverseco". Al politika honesteco apartenas la konfeso, ke ni povas regi ĉion nur per politikaj meĥanismoj, kiuj fakte plenumas la deziron kaj konformas al la ideo de "Unuiĝintaj Eŭropaj Nacioj". Ĉiu scias, sed ne laŭte elparolas tion, ke la definitiva pluekzisto de Eŭropo kuŝas en komuna lingvo, ĉar la kreskantaj mondvastaj problemoj postulas en preskaŭ ĉiuj sferoj intensiĝon de la politika kunlaboro ene de EU per reciproka oficiala komprenilo – ne per nacia lingvo, kiu dominas alilingvanojn kaj degradas ilin al nur duarangaj eŭrop-civitanoj. Esperanto estas planita lingvo por internacia komunikado, proponas sin kiel relaksa lingvo, kiel "dua lingvo por ĉiuj", kiel pontolingvo kiu neniam volas forpuŝi aŭ duarangigi iun ajn, eĉ la plej malgrandan, nacian lingvon.

R. Sachs, prezidanto de ISAE

**Bedaŭrinda verko**

En la dua parto de nia vivo ni forĵetas la noblajn idealojn de la junaĝo kaj nomas tion "maŭriĝo" kaj "gajno de spertoj".

Honoré de Balzac

Ignat F. BOCIORT

Antaŭparolo

Anstataŭ firme agadi kaj argumenti por neŭtrala internacia lingvo, ekzistas esperantoparolantoj, kiuj faras ĝuste la kontraŭon. Pri tio mi volis paroli dum la konferenco okaze de kaj omaĝe al la fiera centjara ekzistado de ISAE, ĉe kiu mi bedaŭrinde pro aĝo kaj malbona sanstato ne povis partopreni. Jen mia skriba kontribuo por la bonvola konsidero kaj serioza priatento de miaj kunISAEanoj kaj legantoj de Scienca Revuo.

Enkonduko

Onidire jam aperis la dua eldono de la broŝuro "Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?" (eld. Hans Dubois, Bellinzona 1999, 51 p.) de d-ro Tazio Carlevaro (dTC). Ĉiam altiras atenton – sed apenaŭ alportas utilon – sensaciaj titoloj. Mi ne intencis skribi pri tiu ĉi verko, kiu instigis min al tre multaj kritikaj konsideroj; atenta analizo de ĝi necesigus multoble pli longan tekston ol tiu de dTC, kaj en nia movado estas multaj homoj pli kompetentaj ol mi rilate al la koncerna problemaro. Tamen, laŭ mia nekompleta informo, niaj spertuloj ne reagis, kvankam la broŝuro estas, eble, la plej damaĝanta inter la malfavoraj tekstoj aperintaj esperantlingve. Kontraŭe, tamen, en iu serioza revuo (ĉu *Literatura Foiro*?) legeblis laŭdeto pri ĝi.

De tempo al tempo, mi aŭdis kelkajn opiniojn pri la verketo. Ili montras ĝian konfuzantan efikon: ĝi estas jen "atentinda averto", jen "interesa esploro", jen "miksaĵo de kelkaj veraj faktoj kun daŭre malicaj intencoj", jen simple "legolibro por la uzo de renegatoj". Iu teoriulo demandis sin, ĉu ĝi apartenas al kulturo – ĉar "kulturo estas plibonigado de la spirita valoroj", sed ĉi tie ne temas pri iu ajn plibonigado. La etiketoj ĉiam tro malmulte diras, do mi jam antaŭ jaroj volis esprimi, kun kelkaj ekzemploj ĉemane, mian malkonsenton kun la premisoj, kun la argumentoj kaj kun la aŭtoraj konkludoj.

DTC estas personeco kun spertoj kaj meritoj en nia movado, tial tia negativa prognozo pli damaĝas, ĉar “parolas ja spertulo“, kiu ankaŭ estas sciencisto, do liaj opinioj ne restas indiferentaj.

Pri la okazaj *negativaj* roloj de sciencistoj, la socio ne tre konscias. Principe, tiuj ĉi povas fari almenaŭ tri erar-tipojn:

a) La sciencisto esprimas opiniojn pri problemoj, kiujn li mem ne serioze pristudis. La hodiaŭaj fizikistoj ridas laŭvoĉe pri stultaj eldiritaj de la filozofo *Hegel* pri fizikaj problemoj jam konataj al liaj samtempaj fizikistoj. Aŭ – kiom da bonintencaj filologoj diris ridindaĵojn pri la internacia neŭtrala lingvo Esperanto?

b) La sciencisto faras grandan (kaj bone pagatan) laboron ne por krei *informon kapablan produkti informon* (kiel pri la laboroj de *Newton*, *Einstein* k.a.), sed por oferti al la socio *mortan informon*, senutilan – kiel ekzemple la “literaturhistoriisto“, kiu volas kontroli la daton de la naskiĝtago de certa verkisto: li vojaĝas tra la lando serĉante malnovajn registrojn por konkludi, ke la koncerna verkisto naskiĝis ne la 8-an sed la 9-an de aprilo.

c) La sciencisto faras ege seriozan laboron, sed false orientitan. Germana teoriulo, ekzemple, skribis kvarvoluman verkon por montri ke la verko de *Lessing* ne estas originala. Li ekiris de erara premiso, ke artverkoj devas esti absolute originalaj – do ne komprenis, ke ĉiu nova majstroverko, ĉu en arto ĉu en scienco, estas akiraĵo sur nova ŝtupo de antaŭaj atingiĝoj, kies potencialo ne estis antaŭe elĉerpita. La “vero“ trovita de la koncerna teoriulo povus esti damaĝa al la kulturo, se oni estus konsiderinta lin serioza. Mia opinie la broŝuro de dTC apartenas al tiu ĉi tria erartipo. Li bone konas sian seriozan temon, sed lia esploro havas falsan celon. Pri tio, poste.

Du eraraj premisoj

La koncepto de dTC baziĝas sur du ideoj, kiuj ofte ripetiĝas en la broŝuro:

1. “Eble la esperantistoj ne taŭge taksis, ke planlingvo devas esti jam komence utila“ (p.38), dum la angla estas prestiĝa, profitodona. Ĝeneraligite, la ideo tekstas: nova sistemo, eĉ naskita sub malfavoraj kondiĉoj, devas esti tuj, *hic et nunc* (lat. “tie ĉi kaj nun“) pli utila, pli bone funkcia, havi pli da prestiĝo ol la malnova, tradicia, riĉa, plurflanke apogata, ĉu pro rutino ĉu pro tujaj interesoj. Tio eĉ en teĥnikaj sferoj ne estas ĝenerale valida: komence, la fajro-pafileo estis malpli utila, malpli prestiĝa ol la pafarko, ĝi atingis pli malprecize eĉ

proksiman punkton; la kaleŝo estis pli utila, pli prestiĝa ol la vapormaŝino kaj tiel plu. En la kulturo, tiu *hic-et-nunc*-koncepto estis ĉiam erara. Dum jarcentoj la naciaj lingvoj estis pli malriĉaj kaj senprestiĝaj kompare kun la hebrea, la helena, la latina, poste ankaŭ kun la slavona – la solaj lingvoj en kiuj estis permesite traduki la Bibliion. La ceteraj lingvoj estis “primitivaj“, ne indaj esprimi noblan enhavon. La novaj sistemoj (t.e. la naciaj lingvoj) bezonis longan tempon por plurflanke maturiĝi, montri siajn esprimpovojn kaj akiri la definitivan prestiĝon por finfine superi la “malnovan sistemon“.

2. Esperanto ne estis/estas akceptata, ĉar “ne idealoj antaŭenpuŝas la mondon, sed la interesoj kaj la profitoj“ (p.37). El morala vidpunkto, tiu ĉi ideo, eĉ se *profito* ne nepre signifas *monon*, pravigas la pragmatikon de la filistoj (laŭ PIV “homoj sen idealo, kiuj zorgas nur pri la ĉiutagaj vulgaretoj kaj estas indiferentaj pri la altaj, noblaj ideoj“). El kultura vidpunkto, la tezo estas erara, ĉar ankaŭ la idealoj celas *utilon*, eĉ la plej altajn utilojn, kutime ege malproksimajn, de la homaro. Jam *Platon* asertis, ke komuna lingvo estus “bonfaro de dioj“ por la homoj, kaj *Leibniz* opiniis, ke la homaro gajnos trionon de sia vivo, kiam ĝi solvos tiun ĉi problemon. Ĉu tiu *idealo*, por kies realigo ankaŭ la esperantistoj laboras, ne celas utilon?

Du nevalidaj argumentoj

Ĉu “la homoj ne volas...“ apartenas al scienca argumentado?

La unua ĉefa starpunkto de dTC estas tiu, ke Esperanto “fariĝis neutila“, ĉar “la homoj ne volas Esperanton“. Jen lia teksto: “Kial diablo insisti por doni ion tian al iu, kiu ne volas ĝin? ... Ni devas konstati, ke Eŭropo ne volas artefaritan lingvon“, ke “la popoloj postulas la anglan“ (p.37). Ĉu? Kiuj popoloj? Eble ĉiuj? Ne ekzistas popolo, informita aŭ ne, kiu jam esprimis ĉi-rilate sian deziron. Legante la broŝuron de dTC, oni povas kredi, ke la popol-amasoj demonstraciis surstrate kaj, en rezolucioj, postulis la anglan. Aŭ ke la aŭtoro petis de la tuta Eŭropo la opinion pri Esperanto – kompreneble post kiam oni komplete klarigis al “Eŭropo“ la funkciojn kaj la grandan signifon de internacia lingvo. Ĉar sen tia klarigo, “Eŭropo“ kviete dormas en rutino, samkiel rilate al aliaj nuntempaj gravaj demandoj kiel ekz. ekologio, malsato, militoj.

Bedaŭrinde tiu “granda mutularo” plurilite vivas “sen lumo”. Kaj “en mallumo ĉiuj katoj estas grizaj”. La “volo” de la homoj baziĝas sur kelkaj aŭ oftaj stereotipoj, antaŭjuĝoj, kaj se “la popoloj” devus senprezare decidi pri fenomenoj tro novaj aŭ intuicie ne tuj percepteblaj, ilia “volo” povas esti tute senvalora, eĉ danĝera: oni adoptis ja “demokratie” la faŝismon en Germanio, la homoj “volis” la “totalan militon” ktp. Fakte dTC iom da sociologia esploro faris nur en Svisujo. Al liaj negativaj konkludoj rilate al la perspektivo de Esperanto kontribuis la malfavoraj decidoj pri Esperanto en la ‘Ligo de Nacioj’ aŭ ĉe niatempaj instancoj – kaj certe ankaŭ la propraj malsukcesoj en la disvastigo de Esperanto. Ĉu tiuj instancoj estas “la popolo”, “Eŭropo”? Maljunan, dikan arbon oni ne faligas per unu aŭ dek frapoj. Kvankam interesitaj al kunlaboro kun la grandega Ĉinio, la sinjoroj en UN (?) plurfoje malakceptis la membrecon de Popola Respubliko Ĉinio, sed fine ili tamen devis akcepti ĝin.

Tre serioza esploro de la sociologo P.A. Kraus: “*Europäische Öffentlichkeit und Sprachpolitik*”, 2004, (“Eŭropa publikeco kaj lingvopolitiko”) montras, ke fakte “Eŭropo” estas nur geografia koncepto, tute ne spirita unuo. Nek ekzistas Eŭropa identeco nek Eŭropa civitanaro. Estas mirige, ke dTC pretendas percepti iun opinion de “Eŭropo”, de pli ol tridek landoj. Li ne povas esti neinformita, ke demokratia lingvo-politiko mankas aŭ estas perfide neglektata en internaciaj forumoj (ne ekzistas pli surda surdulo ol homo, kiu *ne volas* aŭdi), ke la landaj registaroj, eĉ de la diskriminaciitaj landoj, ne konscias pri la neceso de internacia lingvo.

Li asertas, ke ekde la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento, la Esperanto-movado ĉiam pli reduktiĝis aŭ eĉ fiaskis. Pri la gravaj kaj nombraj atingajoj post la 30-aj jaroj (Esperanto-kursoj en pluraj universitatoj en diversaj landoj, multaj beletraĵoj, valoraj verkoj, leksikografiaj, gramatikaj, historiaj laboraĵoj ktp.) li ne parolas. Tamen, parte li pravas: la nuna evoluo de la movado estas pripensinda. Sed ni ne forgesu, ke la sociaj procesoj havas *nelinearan evoluon*: kiu povintus antaŭvidi en 1969 la eventojn de 1989? Sinusa, ne daŭre ascenda evoluo propras al tiuj procesoj. 120 jarojn post sia naskiĝo, la Esperanto-movado jen en iuj sektoroj stagnadas, sed la kialoj tute ne kuŝas en la “volo” de la homoj, kiu estas subjektiva faktoro, kaj tiu parta stagnado neniel signifas “fiaskintan idealon”.

La interhoma frateco aperis jam ĉe Konfuceo antaŭ 2500 jaroj, la interpopola paco jam ĉe helenaj dramistoj – ĉu la homoj “ne volis”

tiujn ideojn? Kial tiom malfacile realiĝas la ideoj pri racia vivo, nefumado kaj similaj? Neniu saĝa ideo estas utopio: ni scias de humanismaj filozofoj, ke la malbono estas forta, sed la bono estas eterna. Utopio estas la postulo, ke granda ideo tuj efektiviĝu. La kulturologio avertas, ke ju pli funda estas iu celo, des pli malrapide, malfacile kaj kontraŭdire ĝi antaŭenmarŝas. ⁽¹⁾

Tri supozojn mi havas rilate al tiu ĉi argumento (“la homo ne volas”) en la koncepto de dTC:

1. Kredeble la trotaksado de la “homa volo” en la broŝuro de la psilŭatro dTC estas restaĵo de malnova, subjektivisma kaj “voluntarisma” teoria (filozofia) eraro, komencinta ĉe *Schopenhauer* “La mondo kiel volo kaj reprezentado” (“*Die Welt als Wille und Vorstellung*”) kaj *Nietzsche*, jam delonge malvalidigita; ĝi havis reprezentantojn ankaŭ en psiŭologio kaj sociologio (*Blondel*, *Durkheim* k.a.). Iuj pozicioj de tiu ĉi koncepto iris tiom malproksimen, ke eĉ akvo “volas” flui al la maro. Ni povas nur esperi, ke iutage la akvo ne “volos” flui al montoj!

2. La negativa prognozo de dTC povas esti influata per la modo de katastrofaj prognozoj, kiuj furoris antaŭ jaroj. *M.Strong* (iama direktoro(?) ĉe UN) estis konvinkita, ke “la 80-aj jaroj estos la plej danĝera jardeko de la homaro”; la 10-an de marto 1982 la Tero devis morti pro ia pozicio de la planedoj; ankaŭ la jaro 2000 alportis nek la finon anoncitan de *Nostradamus* aŭ deduktitan el Biblia diraĵo, nek la kolapson per komputiloj. Sombraj kasandraĵoj kun sia riĉa fantazio havas ian ekskuzon nur, se ili celas averti la homojn, mobilizi ilin kontraŭ malbono (ekz. tiuj de ekologio), dum nura terura fatalo ne esprimas amon al la homo, sed nur konfuzas kaj malesperigas. ⁽²⁾

¹ Ni aldonu, ke volo aŭ nevolo de la homoj povas rapide interŝanĝi la rolon (vd. la romiajn dramojn de *Shakespeare*). Iam eĉ nobeloj kaj reĝoj *ne volis* lerni skribi kaj legi; la infanoj “volas” nur ludi, volas manĝi nur sukeraĵojn, ne legomojn kaj lakton; la drinkemuloj volas alkoholaĵojn ktp. Tial “la volo” de homoj neniam aperas en la argumentado de seriozaj futurologoj (*E.Cornish*, *H.Kahn*, *W.Harman*, *A.Toffler*, *I.Olteanu* k.a.). Ekzistas ankaŭ libroj pri “la historio de la homa stulteco”, kiuj donas multajn ekzemplojn pri stultaj eraroj de la homoj, kiuj jen “volis” ion absurdan, jen “ne volis” ion saĝan, ion bonfaran.

² Kion dTC opinias pri kuracisto, kiu diras al sia paciento: “Vi baldaŭ mortos”? Ni ne neglektu la malbonan efikon de sin-mem-realigeblaj profetaĵoj faritaj de prestiĝaj personoj.

3. Ni povas, parte, kompreni d-ron TC. En Svisujo, lia patrujo, la lingvo-problemo estas aparte komplika, loko por Esperanto apenaŭ troviĝas. Eble tio kondukis lin al “tunel-vizio“, al “perspektivo-tramia-fenestro“, pri kiu futurologoj avertas. Ĉiu veraĵo validas nur por tiu segmento de loko aŭ tempo, el kiu ĝi estis deduktita. Tio kio okazis en unu, du, tri ... n okazoj montras nur la *eblan* evoluon, ne la *evluon mem*. Valida konkludo postulas la studadon de la kompleta serio de la koncerna fenomeno. La sociaj procesoj ne similas al planadoj, kies trajektorio estas determinebla per tri aŭ kvar punktoj.

La estonteco de Esperanto, samkiel la estonteco ĝenerale, ne *ekzistas*, ĝi devas *esti konstruata*, kaj la kleruloj, kiel multiplikantoj de ideoj en la socio, bonvolu roli response. Nek logike, nek historie la aserto “la homoj ne volas“ apartenas al scienca argumentado; dTC ne povus nombri tiom da *informitaj homoj*, nevolantaj Esperanton, kiom da ili jam *volis* ĝin dum la mallonga historio de la movado, kaj potenciale volas ĝin, pro konataj kialoj. Sed eĉ el la loĝantaro de urboj (kion diri pri la vilaĝanoj?) nur *eta parto* aŭdis pri Esperanto (kaj kion ĝi aŭdis!) kaj el inter tiuj nur *eta parto* komprenis, ke temas pri *la propra afero*, kaj el inter tiuj nur *eta parto* havas tempon, forton kaj entuziasmon por mem engaĝiĝi. Pri kies *volo* aŭ *nevolo* parolas dTC? Oni sufiĉe ofte jam profetadis la morton de Esperanto kaj ties movado – tamen, ne mortas ĉevalo pro amo al la korvoj.

Ĉu vere Esperanto ne havas pacajn funkciojn?

Dum la lastaj du aŭ tri jardekoj, iuj intelektuloj, eĉ seriozaj, anstataŭ krei novajn kulturaĵojn, praktikas diversajn deflankiĝojn (ekz. *Volapuko por esperantistoj*) kaj konfuzas la movadanojn per falsaj argumentoj kontraŭ la de longe pravigitaj principoj de Esperanto. Same, anstataŭ firme *agadi kaj argumenti por la ideo*, oni tro multe babiladas (kio, kompreneble, ne kapablas vere antaŭenigi la movadon).

Inter la teoriaj eraroj, eble la plej signifa estas tiu, ke Esperanto ne havas pacajn funkciojn. Por dTC, la unua argumento ke Esperanto “fariĝis neutila“ estas ĝuste tiu ideo. Jam sur la unuaj paĝoj de sia broŝuro, li volas klarigi “kial mortas la sankta espero de Esperanto“ al kiu mankus realaj pacaj sencoj. Normale, kaj science, li devintus analizi la jam konatajn argumentojn bazitajn sur la apartaj funkcioj de komuna neŭtrala lingvo, kaj montri ke ili estas eraraj. Anstataŭ tio,

li volas per ununura frapo ĉesigi ĉiujn diskutojn: “Eĉ gravaj interetn[i]aj bataloj okazis en populacioj, kiuj parolas la saman lingvon (Nordirlando, Bosnio, Ruando, Burundio ktp.)“ (p.6).³ Estis do tiom facile malkovri Amerikon por miloj da esperantistoj, kiuj verŝajne ĝis nun ne eksciis pri ribeloj, revolucioj kaj aliaj konfliktoj inter samlingvanoj. Kaj tiuj ĉi naŭvuloj volas paciĝi la interbatalantojn per la konsilo ... paroli la saman lingvon! Tiel nekulturitaj kaj senraciaj la esperantistoj estas! Sed por vidi konfliktojn inter la samlingvanoj, ne necesas iri al Ruando kaj Burundio: sufiĉas vidi la ofte sensencajn kvereladojn inter esperantistoj, kiuj cetere per sia lingvo “promesas al la mondo sanktan harmonion“ – do, pacon kun la mondo, sed ne kun najbaroj, amikoj kaj “samideanoj“.

Fakte la menciita kontraŭesperanta aserto de dTC tute ne respondas al la demando, ĉu Esperanto havas pacajn funkciojn, sed alian demandon, nome, ĉu Esperanto povas aŭ ne povas likvidi sociajn kontraŭdirojn. Kompreneble, tion povas nek Esperanto nek la hodiaŭaj fortaj Organizaĵoj Internaciaj, tion povis nek la ĝisnunaj revolucioj, promesintaj *liberté, égalité, fraternité* (libereco, egaleco, frateco) aŭ ion similan. Oni povas tamen esence raciigi la interhomajn rilatojn laŭ homecaj kriterioj. Ĉu la aŭtomobilo estas neutila, ĉar ĝi ne povas surgrimpi montojn? Tio ne estas ĝia funkcio! Ĉu *Zamenhof* celis likvidi per Esperanto ekzemple la klasbatalon?

Sciante, la lingvo estas ilo por komunikado. Sed komuna, egaleca, neŭtrala lingvo povas ankaŭ morale kaj intelekte unuigi la homojn, amikiĝi tiujn kun la samaj celoj, faciligi interetnajn kontaktojn, precipe de simplaj homoj, ĉar pli-aŭ-malpli regado de iuj naciaj lingvoj estas apanaĝo de mallarĝa elita tavolo. Neŭtrala lingvo faciligas ankaŭ la reciprokan malkovron de valoroj kaj, en nia epoko, ĝi edukas al universalisma spirito.

Se mi ne eraras, *Aristoteles* en sia “Etiko“ (aŭ alia antikva aŭtoro, moralisto) admiris la varman kaj fidelan amikecon por bonaj faroj, dum tiu, kiu baziĝas nur sur komuna amuziĝo, estas ŝanĝebla, kaj tiu, kiu baziĝas sur malbonaj faroj, sur egoismo, propraj intereso, ne rajtas nomiĝi amikeco – ĝi ofte eĉ estas akompanata de la deziro mortigi la „amikon“ por sola profiti de fia gajno.

³ Tiu erara opinio cirkuladas kiel prava; mi aŭdis ĝin el la buŝo de serioza, elstara esperantisto kaj legis ĝin en la artikolo de *R Hable en Humankybernetik* (1-a kajero, marto 2004, p.15).

Ne necesas substreki por la psiliiatro dTC, ke paco kaj milito havas ankaŭ spiritajn komponantojn: “La milito komenciĝas ja en la mensoj de la homoj”. Tial la agresantoj unue parolas al siaj subuloj, por ideologie konvinki ilin pri la “diableco de la malamiko”, kiun oni eĉ ne rajtas kontakti ktp. Ĉu komuna lingvo (kiu naciskale montris sian unuigan forton) kun siaj amikaj, rektaj interpopolaj kontaktoj (kiuj havas unuarangan lokon en la konscio de esperantistoj) ne konstruaŭstaras al tiu blinda agresema sinteno? La pacigaj rilatoj, samkiel la sanigaj funkcioj de puraj akvo kaj aero, ne estas tuj videblaj, ne havas la rapidan efikon de la *malpacaj* rimedoj, bazitaj sur diversaj fiaj konsideroj, financaj profitoj kaj tiel plu. Tamen, la paco provizora, tragedia, terure multekosta, kiun koalicio de ŝtatoj “realigas” per militoj, “paco” poste gardata per armeo kaj ĝendarmoj (ekz. en la iama Jugoslavio), absolute ne estas komparebla kun la frateco kaj amikeco, kiujn Esperanto flegas, en spirito de *demokratia internaciismo*. Nia “paco” evoluas malrapide, konforme al la dinamiko de naturaj procesoj, sed ĝi povas havi multe pli larĝan demokratian bazon, kaj tio estas premiso por raciaj solvoj de konfliktoj. Bedaŭrinde niaj celoj, kune kun la aliaj porpacaj streboj, malmulte efikas nuntempe, ĉar aĉaj rondoj, armilproduktantaj trustoj, avidaj je senfinaj profitoj, nutras aŭ vekas naciismajn kaj aliajn demonojn por malpacigi la homojn. Sed nia laboro estas, principe, kontraŭstaro al krima teniĝo, akompananta la hegemoniajn celojn, kie rolantoj trovas, por ĉio ajn al ili nekonvena, kialojn por detruigi ties landon kaj mortigi laŭ la proverbo “kiu volas mortigi sian hundon deklaras ĝin rabia”.

Ĉiu esperantisto scias, kiajn pacfavorajn ŝanĝojn en lia sinteno kaŭzis la okupiĝo pri Esperanto, precipe la renkontiĝoj kun samcelanoj en tiuj mikromodeloj de la racia mondo, kiuj estas la internaciaj Esperanto-aranĝoj.⁴ Tiaj ekzemploj multas en Esperantujo, dum la naciistoj estas ekskluzivistaj. Por ili la homo ne povas aparteni al du popoloj, dum la esperantistoj apartenas al ĉiuj popoloj; la naciistoj volas nur profiti de aliuloj, kiujn ili rigardas kiel virtualajn malamikojn, t.e. ili similas al vagabondaj hundoj, kiuj ŝatas la oston, sed ne la homon, de kiu ili ĝin ricevis. Ĝuste en Esperantujo oni observas, kiom absurda estas la naciismo.

⁴ Aliloke mi rakontis pri sinceraj konfesoj, kiujn faris post kelkaj tagoj da persona konado, esperantistoj apartenantaj al tradicie “malamikaj” etnoj. Al mi mem, unu sola Esperanto-amiko, la bedaŭrinde forpasinta kolego *Podmele*, faris karaj siajn landon, Ĉeĥion, kaj lingvon, antaŭe por mi abstraktaĵojn.

DTC aŭ liaj samopinianoj asertas, ke ankoraŭ per la angla lingvo estas atingebla la sento de homa egaleco, ĉar, se ĉefio kaj rumano konversacias en la angla, ili estas ja “egalaj”. Tio estas sofismo. Ili egalas same kiel egalas ĉiuj mizeruloj de la mondo. Sed en internaciaj kongresoj, konferencoj kaj organizoj, en sciencaj bibliografioj, en facilajoj dum eksterlandaj vojaĝoj, en kompreno de la plurlingvaj klarigoj por medikamentoj ktp. ili estas tre malegalaj kun la personoj el anglalingvaj landoj.⁵

La racia solvo *jam ekzistas*, kaj estas senrespondece nomi “ĝisostaj” kaj “neŭrozaj” la esperantistojn, kiuj vidas la eraron, multekostan kaj nefunkciantan. La “nur sur-lipaj” esperantistoj prihontigas kaj mallaŭdas la persistantojn, ĉar por la surlipuloj estas “interesa” nur agado simila al promenado sur bulvardo, sed nur dum bela vetero. La malegaleco de diverslingvanoj vidiĝas ankaŭ en tio, ke sciencistoj nedenskaj anglalingvanoj sufiĉe interkompreniĝas, nur se ili estas matematikistoj, fizikistoj aŭ ĥemiistoj (kun ciferoj kaj kelkaj internaciaj simboloj). Se ili estas fakuloj pri spiritaj sciencoj (filozofio, artkritiko ktp.) ilia “angla lingvo” restas sub scienca nivelo. Ili tuj fariĝas nur “kvaronaj sciencistoj”, vera faka diskuto kun denaska anglalingva kolego nur peneg eblas kaj mallonge daŭras.⁶ Ekzistas pluraj aliaj pruvoj, ke nek la angla (ofte laŭdata, sed ege malofte regata), nek alia nacia lingvo povus roli tiom fratece, egalece, post malmulte da fortostreĉoj, elspezoj ktp. kaj – potencie – por tiom da homoj, kiom la neŭtrala internacia lingvo. Ĉi-rilate ni memoru, ke en la moderna epoko, humanismaj verkistoj, filozofoj, eseistoj, de *Tolstoj* ĝis *Tagore* kaj aliaj, ofte substrekis la rilaton inter amikeco kaj egaleco: “la amikeco estas ĥilino de egaleco” (*Proudhon*), “la amikeco malaperas tie, kie ĉesas la egaleco” (*Aubert*) ktp.

Jen ankaŭ primeditinda fakto beletra: Kiu legas la libron “La Zamenhof-strato”, verkitan de la polo *Roman Dobrzyanski* kaj la inter

⁵ La rumanoj vidis malrespekton kontraŭ ili en tio, ke internacia firmao *Voskov-Moulinek* vendas en Rumanio, mezgranda lando de Eŭropo, elektrajn aparatojn kun klarigoj pri ties funkciado en kvin lingvoj, sed ne en la rumana. Eĉ se tiaj klarigoj estus en 50 lingvoj, tio estus nur ĝis-ĉiela absurdaĵo “samkiel oni volus enigi najlon en la muron batante ne per martelo, sed per ... la muro” (akademiano *Gr. Moisis*, apoginto de Esperanto en Rumanio).

⁶ vd. la konfeson de la semiotikisto *Umberto Eco* pri sia “sendigna” angla, kiu estis korektenda fare de anglalingva fakulo.

parolojn kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, tiu trovas plurajn argumentojn pri la amikeca kaj paca funkcioj de Esperanto. En sia recenzo pri tiu ĉi romano, Dirk Bindmann ("La ondo de Esperanto", n-ro 3, 2004) aldonas scenon legitan en la romano "La restado" (de Hermann Kant): "Se la germanoj estus parolintaj Esperanton kaj la homoj en la Zamenhof-strato estus parolintaj Esperanton, ĉu ili estus komprenintaj unu la alian, ĉu pro tio la Zamenhof-strato kaj aliaj stratoj en Varsovio estus ne dezertigitaj?" Jen esperantista demando. Entute, la mirinda 'Eta princo' de Antoine de Saint-Exupéry, sciis, ke la veron oni devas kompreni (ankaŭ) per la koro. Ĉu ni scias tion? Ĉar sur seka branĉo ne kantas najtingalo. Konklude, la tro rapide skribitaj ideoj de dTC ne estas argumentoj kontraŭ la pacaj kaj amikecaj funkcioj de Esperanto. Nia lingvo apartenas al la kulturo de la paco.

Ekzemploj de kelkaj aliaj diverstipaj eraroj en la broŝuro

En la unua paragrafo de la provo, malŝate kaj ironie titolita komenca ĉapitro "Naskiĝo kaj morto de la sankta espero" la aŭtoro skribas: "Esperanto estas necesa al la monda paco. Rimarko (lia, n.n.): temas pri la teorio de la benata mond-ordo. Do la malamikoj de Esperanto estas malamikoj de la paco. Ni scias, ke ofte la kontraŭo estas vera, ĉar ne la formo gravas sed la enhavo" (p.6).

1. Videble dTC uzas stilajn piruetojn, ŝatatajn de iuj eseistoj, kiuj preferas stilajn malklaraĵojn, dum la vero postulas klarajn frazojn, netaŭgajn por ĵeti cindron en la okulojn de la legantoj. Al kiu apartenas la konkludo "do la malamikoj de Esperanto estas malamikoj de la paco"? Al li aŭ al ni? Certe, al nia movado, laŭ dTC, ĉar nin li volas ironii, sed li nenie legis en la dokumentoj de UEA tian falsajon, kiu supozas jenan silogismon:

Propozicio A: nur la amikoj de Esperanto estas amikoj de la paco.

Propozicio B: Petro kaj Paŭlo estas malamikoj de Esperanto.

Konkludo: Do ili estas malamikoj de la paco.

Aŭ, ĝeneraligite, en tion, kion la logiko nomas "universalaj propozicioj", la malamikoj de Esperanto estas malamikoj de la paco. Sed sen la propozicio A, lia silogismo estas nur propra kreaĵo, falsa, erariga, kaj, liaparte, ludado sen *fair play* (= honesta, laŭregula ludo) ĉar li atribuas al ni malveraĵon, necesan al facila bagateligo.

2. Lia frazo *ni scias, ke ofte la kontraŭo estas vera, ĉar ne la formo gravas sed la enhavo* konfuzas plurfoje la leganton: pri kiu "kontraŭo" temas? Ĉar la propozicio *A estas B* povas havi diversajn "kontraŭojn": *A ne estas B*, *ne-A estas B*, *A estas ne-B* k.s. Plue: kio estas ĉi tie "formo" kaj kio "enhavo"? Kaj fine, laŭ kiu logiko ne povas esti ambaŭ gravaj, kaj la formo kaj la enhavo? Liaj konceptoj ne estas ligeblaj al la filozofia problemo de rilato inter *formo* kaj *enhavo*. Ĉiu komercisto scias, ke lia varo devas havi bonan, belan pakumon, ĉar ankaŭ la formo gravas. Ĉiu afabla kontraŭanto scias, ke en diskuto li devas diri: "Bonvolu permesi, ke mi esprimu alian opinion", dum senhontulo povas krii: "Via opinio estas stultaĵo, azenaĵo, pura idiotaĵo" – kaj la homoj terure kverelaĉos, kiel ekz. en la satira rakonteto de Berthold Brecht pri la temo, *de kie venas la truoj en la fromaĝo*. En tiaj situacioj, la enhavo estas kaj ne estas la sama, ĉar la "formo" havas "dialektikajn" rilatojn kun la "enhavo". La eraro de dTC troviĝas ankaŭ en la estetiko: la "formalistojn" interesas nur la formo (gravas *kiel* vi skribas, ne *pri kio* vi skribas), dum la "enhavistoj" opinias la kontraŭon ("sterkaĵo restas sterkaĵo ankaŭ en la popa sako"), kaj Goethe, prave, ironiis ambaŭ pedantajn teoriulojn.

3. dTC asertas, ke Esperanto ne havas malamikojn, do ĝi *ne sukcesas pro la propraj malfortoj*. Ĉi-rilate, li citas artikoleton de Jerzey Leyk, kiu opinias ion similan. Sed inter la ĉirkaŭ 80 titoloj de sia bibliografio, dTC ne aldonas (kaj en la teksto nenie mencias) la gravan studon de Ulrich Lins pri la persekutoj kontraŭ nia lingvo. Li preferas elekti opiniojn pli aŭ malpli malfavorajn al Esperanto, kaj la leganto rajtas supozi, ke la aŭtoro ne ĉiam objektivite ekiris de faktoj al valida konkludo – sed, kontraŭe, ke li serĉis "pruvojn" por sia dekomence pensita konkludo. Tio ne estas scienca sinteno. Kiel kunaŭtoro de "Esperanto en perspektivo", li certe sciis pri la persekutoj de Hitler, Stalin kaj aliaj diktatoroj kontraŭ Esperanto. Li ankaŭ sciis pri la fia obstrukco de prof. Blinkenberg, en grava internacia forumo (Urugvajo), por forrabi la tutan tempon, en kiu Lapenna devis argumenti por Esperanto.⁷

⁷ Mi aldonas tre konatan fakton, ke ĝis 1989, en Rumanio validis skriba ordono de cenzuro: la eksterlandaj esperantlingvaj periodaĵoj devas esti konfiskitaj ĉe la landlimoj, kaj en la rumanaj periodaĵoj eĉ la vorto *esperanto* ne rajtas aperi, ĉiukaze ne en pozitiva senco (ni komencis prelegi pri Esperanto en sciencaj rondoj, ĉar tio estis ja nur "scienca diskuto", kio ne estis malpermesata). Jen alia, negrava sed

Se hodiaŭ multaj kontraŭuloj de Esperanto levas siajn kapojn, tio estas nur pro tio, ĉar ĉi-momente ili vidas neniun danĝeron en la internacia lingvo. Do, kion ili devus fari, por ke dTC kaj aliaj teoriuloj konsideru, ke Esperanto havas malamikojn?

Jardekojn Esperanto estis infano kun piedoj kunligitaj, al kiu oni riproĉis, ke ĝi ne kapablas iri. Hodiaŭ Esperanto enpenetris en la internacian informan reton, sed jen oni trovas ĉiam novajn riproĉojn kontraŭ ĝi; dTC certe scias ankaŭ, ke en interreto Esperanto estas “proporcie giganta” (*Ch. Rivière*).

4. Tute surpriza kaj nekomprenbla estas la opinio de dTC, ke ne ekzistas “lingvomortigo”. “Nur la esperantistoj kredas”, ke la demando pri *lingva imperiismo* kaj pri *lingvomortigo* estas grava. Lia opinio temas pri “fakte simpla lingva sinmortigo, dezirata, revata, petata, favorata, ŝatata. Nenio perforta okazas aŭ okazis. Temas pri elekto” (p. 25). Do, jam la dakoj, la galloj, la iberoj k.a. “elektis” la latinan, la aborigenaj sudamerikanoj “elektis” la lingvojn de la eŭropaj konkerantoj, kiuj venis kun fajro-pafarmiloj kaj ferocaj hundoj, kaj, en la afrikaj kaj aziaj kolonioj de eŭropanoj, la sklavigitaj popoloj “elektis” la lingvojn de la koloniistoj, venkintaj per la bajoneto de imperiisma soldato.

En sia broŝuro, dTC mencias ie la revuon “*The Scientific American*” (kun la interesa, pripensinda mencio, ke la „Scienca Revuo“ de ISAE povus traduki iujn artikolojn de la valora anglalingva periodaĵo). Nu, en tiu ĉi usona revuo aperis, antaŭ kelkaj jaroj, artikolo, kiu montris, ke en Eŭropo ekzistas ĉirkaŭ kvardek “lingvaj konfliktoj”, ĝuste ĉar neniuj etnoj “deziras, revas, petas, favoras, ŝatas” la mortigon de la propra lingvo, dum hegemonio de certa lingvo estas la unua paŝo al lingva mortigo.

En la moderna kulturo estas ja konata la ideo, ke ataki la lingvon de iu egalas al atako de lia animo. La *egaleco* fariĝis “modo”, bedaŭrinde nur rilate al eksteraj simboloj: la ronda tablo, la neŭtrala monero “eŭro” por EU (do nek marko, nek franko, nek liro).

Mirige, ke la serioza intelektulo dTC ne vidas, ne diskutas la enorman kulturan perdon, kiun la homaro havas, se la modernaj etnaj lingvoj kaj iliaj valoroj formortus. Male, por li temas pri “dezirata”

signifa ekzemplo: nia ege sukcesa, granda murgazeto en la moderna halo de la universitato en *Timișoara* estis iunokte detruita, makulita per anglalingvaj sloganoj.

sinmortigo. Ankaŭ iu usonano skribis en “Scienca Revuo”, ke estas bonvena la morto de lingvoj – kompreneble ne de la angla.

Kiucele?

Kutime la sciencaj verkoj havas precizan celon, kiun la aŭtoro komence mencias. Tio ne estas deviga ĉie. Precipe en eseoj aŭ rakontoj, la aŭtoro kalkulas kun la inteligento de la leganto kaj ne diras, pri kiu celo temas. Ankaŭ dTC ne konfesas, kiun celon li havas. Li sincere mencias en la unuaj linioj de la broŝuro, ke lia “prognozo pri la pluvivo de Esperanto estas, kiel konate, negativa” (p.2). Tio estas lia afero. Tamen, kial li sentis necesa labori por nei la sencon de plia poresperanta laboro? Ĉu per tio li celis plibonigi la socion? Ĉiu povas forlasi partneron, religion, partion aŭ landon, sed estas tute alia afero, se oni poste ŝetas malpurajn ŝtonojn en la fontanon, kie oni iam trinkis puran akvon.

En nia nuntempa mondo, plena je politikaj mensogoj kaj krimoj, de koruptado, de homoj monavidaj, de ĉiaspecaj malvirtuloj, estas vere admirindaj la homoj, kiuj flegas la spiritajn valorojn de la homaro. La esperantistoj apartenas al tiu homgrupo. Jen elstara diraĵo de iu klasiĉulo: “Sankta laboro estas tiu, kiu en si mem trovas la rekompencan” – alivorte: la volontula engaĝiĝo de homoj, kiuj pasie saltas unu paŝon antaŭen por apogi validajn ideojn.

Tia estis la heroo laboro de epokfaraj sciencistoj, verkistoj, revoluciuloj kaj ankaŭ la modesta laboro de la esperantistoj, kiuj kelkfoje jardekojn laboras kun la celo kontribui por almenaŭ parte raciigi la vivon. Pri tiaj homoj dTC esprimas sian respekton, *kaj ĉekomence kaj ĉe la fino de sia teksto*: “Ili estis ekzemploj, en sia sindediĉo” (p.38). Tamen la leganto pensas pri la proverbo “sur lipoj sukero, en koro malkonsidero”, kiam li legas la *miron* de dTC, ke iuj restas en la nesukcesinta Esperanto-movado.

Tio estas “iom mistera” (p.7). Por tio li trovis jenan malŝatan “analogion”: “Se vi ludas hazardludon, kaj se vi estas ‘normala homo’, kiam vi rimarkas, ke jenan vesperon vi restis senmona, vi decidu, ke vi jen-vespere ĉesigos la hazardludon” (samloke). Sed se, spite al la perdo, vi tamen plue ludas, en la espero regajni la perditan monon, vi estas ‘nenormala homo’ kaj “la sperto instruas, ke baldaŭ via ŝuldo atingos 100 000 frankojn. (...) Supozeble longjaraj esperantistoj estas tiaj homoj” (samloke). Do laŭ dTC ne ekzistas aliaj kialoj por la daŭ-

ra, firma agado de esperantistoj ol tiu, ke ili ne komprenas la neceson, ĉesigi la laboron pro la *jam fiaskinta afero*.

Ni memoru pri la grava penso de *Gorki*: homo de unu firma ideo kaj konvinko, al kiu li dediĉas sian vivon, homo en kies animo la amo al ideo estas same forta kiel lia racia pensado, tiu estas vere “granda homo” – ĉu revoluciulo, ĉu sciencisto, ĉu apostolo ktp. Vid-eble, nia ŝatata dTC preferas flegi papiliojn petolantajn de floro al floro; ili bremsas la disvolviĝon de Esperanto, ĉar ekzistas ja pluraj planlingvoj.

La malrespekto de dTC por la esperantistoj kaj por ilia movado vidiĝas ankaŭ en tio, ke niaj konvinkoj kaj atingajoj estas por li (kaj por liaj samopiniantoj) nur “mitoj”: mito, ke “Esperanto transformiĝis al vivanta lingvo”, mito pri “Esperanta kulturo” k.a. Do, oni kreis pseŭdo-koncepton de *mito*, nur por denove bagateligi la aferon; ne ekzistas mitologio de moderna kulturo. Sen misuzo de konceptoj, niaj ideoj povus (eventuale) esti eraroj, sed neniukaze estas mitoj – escepte se malica intenco volas tion, ĉar la mitoj estas pli aŭ malpli fabeloj, produktoj de la fantazio kadre de iama *mita pensado*.

Bedaŭrinde aliajn, aŭtentikajn kultur-historiajn mitojn ni ofte renkontis dum nia agado: la mito de Sizifo, ĉar ni ĉiam denove devis rekomenci la laboron detruitan de diversaj diabloj aŭ historiaj cirkonstancoj; la mito de Fenikso, ĉar nia movado ĉiam denove renaskiĝis el sia cindro; la mito de Pigmaliono, ĉar ni forte enamiĝis al nia propra kreaĵo k.t.p.

Ni lasu al la konscienco de estiminda psiĥiatro dTC apreci la taŭgecon de siaj malŝataj “analogioj” kaj aliaj malicaj konsideroj. Eble li nur celis “diri la veron”, sed per tiom da eraroj oni neniam atingas la veron kaj, se temas pri estonteco, kreita aŭ suferata de homoj, la “vero”, apogata per falsaj premisoj kaj argumentoj, pli ŝajnas fantaziaĵo. Ni memoru, ke “vero” tute ne estas tio, kion “mi pensas, mi kredas”, ofte eĉ ne tio, kion “mi mem vidis”.⁽⁸⁾

⁸ Juĝistoj scias, ke ofte tri atestantoj prezentas tri variantojn pri la sama “vidita” fakto. Tio nur montras, ke la vero, samkiel la bono kaj la belo, havas ne nur objektivajn trajtojn, sed ankaŭ subjektivajn komponantojn. Tio videblas precipe en la aprecado de ampleksaj, sociaj fenomenoj – kiu do posedas la “precizan, kredeblan veron” pri klasbatalo, revolucio ktp.?

Atentindaj estas ankaŭ la demandoj: *kion vi volis?* “Kion vi atingis per via vero”? Malnova sagao rakontas pri malfeliĉa reĝo, kiu, korduŝe ploranta, insultis iun “verdirinton”: “Pro via veraĵo, mi mortigis mian karan edzinon, ruinigis mian familion, malfeliĉigis miajn gefilojn kaj min mem: mortu, krimulo!” Espereble la “veraĵo” de dTC ne havos similan efikon por la Esperanto-movado. Ĉiukaze, la broŝuro estas kaj restos bedaŭrinda mispaŝo.

Pri la konkludoj de la aŭtoro

Jen lia konkludo: “En 2045 supozeble estos la fino de Esperanto-movado, (...) En 2100 Esperanto estos muzeajo” (p.37). Kial ĝuste la jaron 2045 nia movado “supozeble” ne postvivos laŭ la opinio de dTC? Kial ne la jarojn 2050 aŭ 2040? Verŝajne tial, ĉar dTC, naskita en 1945, fariĝos centjara en 2045 kaj povus festi sian jubileon kuŝante sur la ruino de la Esperanto-movado kaj admirante sian profetaĵon.

Mi sincere deziras al li alian, pozitivan ĝojon por tiu jubileo. Nu, se la nunaj evoluoj en la mondo persistos aŭ plifortiĝos, iam estos muzeajoj ankaŭ la homo sen gasmasko, la arbo, floro, birdo, fiŝo “en la plej bona mondo ebla” (*Leibniz*). dTC havas nenion por diri aŭ por instigi al la laboro kontraŭ tiu ĉi evoluo, ĉefe determinita de freneza kurado por profito, kiun li tiom ofte kaj sincere priantas en sia broŝuro.

Ni ne povas hodiaŭ diri kun certeco, kiel iam aspektos la lasta solvo de la monda lingvoproblemo. Sed Esperanto jam eniris en la historion, ĉar ĝi montris praktike, por la unua fojo, ke neŭtrala lingvo estas funkcikapabla, kaj homoj en preskaŭ ĉiuj landoj de la Tero bezonas kaj uzas ĝin, eĉ multaj gejunuloj, precipe en interreto kaj en dekoj da ĉiujaraj Esperanto-aranĝoj (do, ne “maljunuloj”, kiuj ne akceptas la pardon de longa tempo en Esperanto-agado, kiel dTC asertas).

Se la mondo evoluos al demokratio, la neŭtrala lingva solvo estos neevitebla. Sed se ĝi evoluos al hegemonio de unu lingvo kaj de ties “venka civilizacio” (kio estas historie, politike, psiĥologie, katastrofo), tiam formortos la aliaj lingvoj kaj kulturoj en la sama “plej bona mondo ebla”.

Ne necesas rememori la enorman spiritan pardon de la homaro, se ĝi – kun manoj kunligitaj kaj okuloj obturitaj – vere falos en la sen-

horizontan kavon, kreitan de la hodiaŭ ŝatata pure pragmatika vizio, kiu eĉ la subskribon de apenaŭ efika *Kyoto*-protokolo ne akceptas.

Ĉu d-ro Carlevaro povus esperantigi d-ron Zamenhofo?

En ŝerca frazo, rakontanta pri li mem en la tria persono, dTC skribas: “Kalkulu kiom da mono, da laboro kaj da tempo mia amiko Carlevaro elspezis por Esperanta propagando. En pli ol 40-jara aktivado, li sukcesis vere esperantigi nur *unu* homon” (p.13). Tamen, samkiel en aliaj “pruvoj” de la broŝuro, temas ne pri reala malsukceso de Esperanto, eĉ ne ĉiam pri la malkompetenteco de niaj “apostoloj”, sed pri la fakto, ke la lokaj, la nunaj, la spirite malpuraj kondiĉoj necesigas *samfortajn agadojn de kontraŭa senco*, aŭ probable pli fortajn ol la obstakloj. Aliloke mi plurfoje rakontis pri tute aliaj sukcesoj de Esperanto (kiujn denove la dogmismaj stalinistoj detruis).

Oni ne scias, kiom da tempo kaj da trafaj argumentoj uzis dTC por dum 40-jara agado esperantigi unu solan homon. Mi ne kredas, ke li, kun siaj hodiaŭaj konceptoj, estis iam esperantisto – li estis nur bona esperantoparolanto. Do la konceman esperantigitan homon oni devus trovi kaj konservi kiel “muzeaĵon”, ĉar, en la tuta historio, li estas la unua homo konvertita, fare de ateisto, al kredo je Dio. Tio estas grandega sukceso de dTC, ĉar, ekzemple, la nuntempa usona prezidanto *Bush* ne sukcesus konverti iun al islamismo. Miaopinie, d-ro *Carlevaro* ne vere povus esperantigi iun ajn homon, ankaŭ se tiu homo estus Zamenhofo mem.

Adreso de la aŭtoro

Prof. d-ro Ignat F. BOCIORT
Wustrower Strasse 1
DE – 13051 – Berlin / GERMANIO

Priaŭtora informo

La aŭtoro finstudis Filozofion kaj Filologion en la Universitato de *Bukarest*, Rumanio, kaj, je la sama universitato, ekfunkciis kiel asistanto kaj lektoro. Li doktoriĝis en la Universitato *Humboldt, Berlin (GDR)*, kie li gastdocentis (1965-1970) kaj esperantiĝis. Profesoro kaj estro de la fakto pri *Beletra estetiko kaj Monda literaturo* en la Universitato de *Timișoara*, Rumanio, ĝis la pensiĝo. Krom siaj rumanlingvaj fakaj libroj, li aperigis multajn esperantlingvajn artikolojn pri strategio de nia movado kaj studojn pri estetiko de la beletra. Prof. d-ro Ignat Florian BOCIORT estas honora membro de UEA.



Gramatikaj aspektoj en komputila internaciigo

Reinhard FÖSSMEIER

1. Enkonduko

1.1 Kio estas internaciigo?

La tefniko de komputila internaciigo, alivorte kreado de plurlingve uzablaj komputil-programoj, ekestis en la 1980-aj jaroj. La unua vaste konata sistemo tiucela estis NLS (*Native Language Support*) de firmao *Hewlett-Packard*; ĝi aperis en 1985 (vd. *Bale & Kellog* 1985).

Celo de internaciigo estas krei programojn, kies lingvo-dependaj ecoj estas izolitaj en aparta bloko, ŝanĝebla sen modifo de la programo mem. Tia lingvo-bloko esence estas listo de vortoj, frazeroj aŭ tutaj frazoj, kiujn la programo bezonas.

Baza problemo de internaciigo estas, ke programisto ne povas antaŭvidi, en kiuj lingvoj lia programo iam estos uzata, kaj se li povus, li ne scius tiujn lingvojn kaj iliajn apartaĵojn. Tial li ne povas memstare prepari sian programon tiel, ke ĝi funkciu kun lingvo-blokoj el ĉiuj tiuj lingvoj. La tefniko de internaciigo solvu la problemon; ĝi faras tion ofertante programadajn kadrojn (kia NLS), kiuj kapablas trakti tiujn lingvajn apartaĵojn. Tia kadro kutime havas la formon de biblioteko da subprogramoj.

Ekzemplo estas, ke la maniero, kiel skribi daton, diferencas inter lingvoj (kaj kulturoj). Internaciiga kadro do proponu metodon, kiu skribas daton laŭ la lingvaj kaj kulturaj kutimoj de la uzanto; la programisto simple voku tiun metodon.

„Internaciigo“ nomiĝas ankaŭ la pretigo de unulingva programo al plurlingva uzo. Kombino el lingvo kaj kulturo en internaciigo nomiĝas „lok-medio“ (angle: *locale*). La konkreta adapto de programo al specifa lok-medio nomiĝas „lokecigo“.